



Boletín

n° 419 Julio - Septiembre 2017



Asociación de utilidad pública

Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio
aperanta de 1949
Numero 419

Redakto-skipo

Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos L.

Revizio: Alejandro Pareja / J. A. del Barrio

Retadreso de la bulteno:
bulteno@esperanto.es

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la respektivaj aŭtoroj

* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn

*Republikado de enhavo nur permesita kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro

Financaj aferoj: financoj@esperanto.es

Aliaj aferoj (escepte de financaj):

admin@esperanto.es

Hispana Esperanto-Federacio *Federación Española de Esperanto*

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7

ES-28015 Madrid

admin@esperanto.es

Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31
0204011961

TRIODOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926
4025

Poŝtelefono: +34 638 547 104

Telefono: +34 914 468 079 (bv. lasi mesaĝon
en la aŭtomata respondilo)

Estraro

Prezidanto: José Antonio del Barrio

Vicprezidanto: Ángel Arquillos López

Sekretario: Águeda Biurrun

Kasisto: Jesús M. García Iturrioz

Voĉdonantoj: Eduardo Berdor
Raúl Martínez
Alejandro Escobedo (prezidanto
de HEJS)

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)

DL: M-39811-2012 / ISSN 2444-8400

Salutvortoj

Karaj amikoj,

Finiĝis la somero en nia mondoparto, kaj nun komenciĝas la taskoj de la nova akademika jaro. Ni revenas kun renovigitaj fortoj post la tre pozitiva postgusto lasita de nia renkonto en Teruelo. Nia plej nova loka grupo montriĝis superba organizanto, pruvante la longan sperton de siaj membroj rilate al socia kaj kultura agado. Ĉeestantoj povis ĝui ne nur tre belan eĉ se ne sufiĉe konatan urbon kaj provincon, sed ankaŭ varian programon, kun multaj eroj interesaj el kultura kaj kleriga vidpunktoj kaj diversaj distraĵoj adekvataj por ĉiuj gustoj. La nombro da ĉeestantoj konservis la kreskantan tendencon de la lastaj jaroj, kaj solidigis la hispanan kongreson kiel nepran eron de la esperanta kalendaro.

Ni havos por 2018 grandan defion. Ne nur konservi la pintojn atingitajn, sed ankaŭ kreskigi ilin cele al internacia gastaro kiun ni ricevus dum venonta somero, pro la okazigo de la Universala Kongreso en nia najbara frata ĉefurbo Lisbono. HEF kaj la junulara sekcio HEJS invitis internaciajn asociojn profiti tiun ŝancon por organizi siajn renkontojn en Hispanio, kaj la respondoj estis pozitivaj. Do, tuj antaŭ la UK la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) celebros sian kongreson en Madrido, kaj ni profitos la okazon por organizi nian nacian kongreson ĉirkaŭ la samaj datoj. Krome, post la UK, niaj junuloj organizos la Internacian Junularan Kongreson en la urbo Badaĥozo, la plej facile atingebla urbo por ĉeestintoj en la UK. Ni esperas ke tiu evento altiros ne nur malpli aĝajn esperantistojn el ĉiuj landoj, sed ankaŭ helpos firmigi la movadon junularan en nia duoninsulo.

Inter ambaŭ datoj restas tamen ankoraŭ multe da tempo por aliaj agadoj. Momentoj por komenci kursojn, organizi kunvenojn, praktiki la lingvon, ĝui nian kulturon. Restas multe da laboro, por la disvastigo kaj firmigo de la internacia lingvo. Ek al la laboro!

José Antonio del Barrio, prezidanto de HEF

ENHAVO

Salutvortoj	1
Nova prezidanto de TEJO	2
Ordinara Ĝenerala Kunveno	3
HEF Novaĵoj (Sukcesa bilanco de HEK en Teruelo)	5
Omaĝoj kaj libroprezentadoj	6
Inaŭgurita la placo de Esperanto en Teruelo	7
Novaĵoj en Hispana Esperanto Federacio	8
Seminario pri la Jaro Zamenhof	8
Prezentita la “Zamenhof Strato” en la hispana	9
Junuloj moviĝas	10
Notinda eĥo en la gazetaro	10
Komenciĝas preparlaboroj por la kongresoj 2018	11
Nekrologe	12
Poezia Angulo (En la akvo gvadiana)	14
La 90-a SAT Kongreso	17
Ĉu la hispana turismo estas daŭripova	19
La 102-a UK de Esperanto en Seulo	21
Industrias kaj Andanzas de Alfanhú	24
E-Kulturo en Hispanio ekster Esperantujo	28
Ĉefkovrilo grafito pri Esperanto ĉe la placo Esperanto de Teruelo	



NOVA PREZIDANTO DE TEJO

Dum la Internacia Junulara Kongreso kiu okazis en aŭgusto en Aneho (Togolando) la valenciano Enric Baltasar estis elektita nova prezidanto de TEJO por la periodo 2017-2018.

En la foto, la nova estraro (kun la nomo de la neĉeestantaj estraranoj)

ORDINARA ĜENERALA KUNVENO

La 24-an de junio de 2017, je la 10:00 horo (dua alvoko) okazis la Ordinara Ĝenerala Kunveno en la *Campus* de Terüelo de la Universitato de Zaragoza, strato Ciudad Escolar, s/n, en Terüelo. Ĉeestis la estraranoj: Eduardo Berdor (voĉdonanto), Ángel Arquillos (vic-prezidanto), Alex Escobedo (voĉdonanto), Rosa López (kasisto), Águeda Biurrun (sekretario) kaj José Antonio del Barrio (prezidanto), kiu prezidis la kunvenon. Partoprenis ankaŭ 27 individuaj anoj kaj 7 kolektivaj membroj (*Frateco* el Zaragoza, Andaluza E-Uniĝo, Kantabra E-Asocio, E-Grupo Bilbao, E-Grupo el Valencio, E-Grupo de Cheste kaj Madrida E-Liceo) reprezentataj de sep el la ĉeestantaj individuaj membroj, entute 38 partoprenantoj. La sesio disvolviĝis laŭ la jena tagordo:

- 1.- Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa kunveno (3a de julio 2016)
Oni aprobis unuanime la protokolon de la antaŭa kunveno aperintan en Boletín n-ro 414.
- 2.- Aprobo de la kontoj kaj kas-stato de 2016.
Oni aprobis unuanime la kontojn kaj la kas-staton de 2016 aperintajn en Boletín n-ro 418.
- 3.- Aprobo de la Raporto pri aktivaĵoj de 2016.
La Raporto, prezentita en la Boletín n-ro 418, estis aprobita unuanime.
La Estraro volas esprimi la dankon de la Asocio al Félix Jiménez Lobo pro lia helpado dum la tuta jaro al la nuna sekretario.
- 4.-Aprobo de la buĝeto por 2017.
La buĝeto, aperinta en Boletín n-ro 418, estis aprobita unuanime.
- 5.- Kotizoj por 2018.
Kun 4 sindetenoj, la kotizoj por 2018 restos same kiel tiuj de 2017.
- 6.- Informo pri la anaro.
Aniĝantaj je la dato 2016/12/31, kiuj maksimume ŝuldas du kotizojn, estis:
 - Individuaj (OM, DM, PM kaj HM):218 (el kiuj 5 apartenas al HEJS)
 - Kolektivaj (KM): 16
 - Entute (Individuaj + kolektivaj): **234**
 - Novaj aliĝoj 2016:8
 - Malaliĝoj 2016:7

Estas granda malsameco inter tiu ĉi informo kaj tiu prezentita dum la ĝenerala kunveno 2016. En ĝi aperis entute 211 anoj, el kiuj 13 estis kolektivaj. La kialo estas, ke ĝis nun la kalkulado de la anaro ne estis tro preciza kaj baziĝis sur datumoj kiel la sendo aŭ ne de etikedoj por *Boletín*. Tio estis eraro, ĉar estas kelkaj anoj, kiuj ne volas ricevi *Boletín* sed tamen daŭre pagas la kotizon kaj estas membroj de la asocio. La kialo de la tri kolektivaj membroj ne aperintaj en 2015 estas, ke nun ni konsideras kiel anoj tri asociojn, pri kiuj ni scias nenion (ili eĉ ne ricevas *Boletín* ĉar ĝi ĉiam estas redonita), sed kun kiuj la estraro devas klopodi kontakti antaŭ forigi ilin definitive. La plejmulto de la novaj aliĝoj okazis fine de la jaro post la nova kampanjo de varbado fare de la estraro.

7.- Modifoj en la estraro.

La Prezidanto informas pri la demisio de la ĝisnuna kasisto, Rosa López, pro personaj kialoj. Ŝi restos kiel respondeculo de la Semajno pri Kulturo kaj Turismo de Katalunio. La estraro proponis al Jesús Miguel García Iturrioz por la posteno de kasisto kaj la asembleo akceptis lin unuanime. Raúl Martínez Anguita daŭrigos sian helpadon al la librotenado. La Estraro dankas al li pro lia helpo dum tiu ĉi jaro.

Sekve, la Estraro konsistas nun el jenaj personoj:

Prezidanto: Jose Antonio del Barrio Unquera, **Vicprezidanto:** Ángel Arquillos López

Sekretario: Águeda Biurrún González. **Kasisto:** Jesús Miguel García Iturrioz

Voĉdonantoj: Raúl Martínez Anguita, Eduardo Berdor, Alejandro Escobedo

8.- Projektoj por 2017 kaj 2018:

Dum la jaro 2017 la asocio daŭrigos la kampanjon de kunmemoro de la datreveno de la morto de D-ro. Zamenhof, kaj oni petas la kunlaboron de la grupoj pri tiu celo.

Por la jaro 2018 la Estraro informis la asocion pri la okazigo de tri gravaj renkontiĝoj en Hispanio, profitante la Universalan Kongreson en Lisbono:

- Konferenco de ILEI, de la 21-a ĝis la 28-a de julio 2018, en Madrido.
- Hispana Kongreso, de la 20-a ĝis la 22-a julio 2018, ankaŭ en Madrido.
- IJK en Badajoz, kunorganizita de la junulara secio HEJS kaj la Kataluna E-Junularo, kun la apogo de la E-Grupo de Ekstremaduro.

La E-Grupo de Cheste organizos Festivalon en la fino de la jaro 2018. Ili petas helpon de HEF por la aranĝo.

9.- Sugestoj kaj demandoj.

La ano kaj nuna helpanto de la Sekretario Félix Jiménez Lobo komentas, ke la asocio ekzistas nur pro siaj anoj kaj, ke la postenoj de la Estraro kaj ĝiaj kunlaborantoj estas tute volontaj, neniuj enspezas iom da mono por la laboro, kaj multfoje ili ne povas bone fari ĉion, kio farendas, pro manko da fortoj. Ĉar la respondeco estas de ĉiuj anoj, li alvokas al la kunlaboro de la anaro kaj petas pli da helpado por la estonteco.

Sen pli de aferoj por pritakti, finiĝas la kunveno je la 11:00 horo.

La Prezidanto

José Antonio del Barrio Unquera

La Sekretario

Águeda Biurrún González

HEF NOVAĴOJ

SUKCESA BILANCO DE LA HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO EN TERUELO

Inter la 23a kaj la 25a de junio okazis en Teruelo (*Teruel*) la Hispana Kongreso de Esperanto. Partoprenis 155 kongresanoj, alvenintaj el deko da hispaniaj aŭtonomaj komunumoj kaj ĉ. 20 landoj el la tuta mondo. Kiel ni estis jam anoncintaj, la programo estis ege varia, kaj inkludis aktivaĵojn instituciajn, laborajn, kulturajn, turismajn, kaj ankaŭ aliajn pli malstreĉajn, dum kiuj eblis simple praktiki la internacian lingvon. Organizigis ankaŭ kursoj kaj oficialaj ekzamenoj, ekspozicioj, prelegoj, libroprezentoj, muzikaj koncertoj (interalie la rekuniĝo de *Kajto Kvarope*, unuafoje post pluraj jaroj, kun partopreno ankaŭ de Martin Wiese), astronomiaj observadoj, anoncoj de eventoj, omaĝoj al historiaj esperantistoj, celebradoj de diversaj centjariĝoj kaj datrevenoj kaj multe pli.

Jam dum la antaŭa semajno disvolviĝis diversaj aktivadoj por konigi Esperanton en Teruelo, kaj ankaŭ oficiala prezento en la Domo de Aragono de Madrido, kiun ĉeestis interalie la Ĝenerala Direktoro pri Kulturo kaj Heredaĵo de la aŭtonoma registaro de Aragono. La oficiala inaŭguro okazis la 23an, kun ĉeesto de magistratano Juan Carlos Cruzado, kiu legis mesaĝon de la urbestrino de Teruelo.

La Kongreson kompletigis du postaj seminarioj, la 26an kaj 27an, unu dediĉita al la Jaro Zamenhof, kaj la alia por junula aktivigo, organizita de TEJO.




OMAĜOJ KAJ LIBROPREZENTADOJ

En la kultura flanko de la Kongreso oni devas elstarigi la memoradon al diversaj okazintaĵoj kaj historiaj figuroj, pro diversaj kialoj. Krom la kunmemoro de la Zamenhof-Jaro, ni devas menciigi la celebradon de la 800-a datreveno de la Geamantoj de Teruelo, la plej konata amlegendo de la urbo, kiujn la esperantista komunumo priomaĝis per poemo verkita por la okazo fare de la poeto Miguel Fernández (*Konstanta amo transe de la morto / Amor constante más allá de la muerte*), kiu estis deklamita dulingve en la klostro de la impona maŭzoleo al ili dediĉita, vizitita de la kongresanoj por la okazo.

La kongreso havis la okazon memori pri la figuro de la arĥitekto, verkisto, socialista politikisto, respublika deputito kaj historia esperantisto Francisco Azorín Izquierdo, naskiĝinta en la provinco Teruelo kaj forpasinta en la ekzilo en Meksikio. La kongresanoj povis ĝui la ĉeeston de lia nepo Ernesto Azorín kaj la prezidantino de Meksika Esperanto-Federacio, Mallely Martínez, kaj de la kontribuoj de la historiistoj Serafin Aldecoa kaj José María Rodríguez Hernández, krom ekspozicio pri li montrita en la kongresejo

Alia aragona personeco memorigita dum la kongreso estis la kinreĝisoro Luis Buñuel,

ĉefrolulo de teatraĵo de Fernando J. López, kies traduko al Esperanto kun la titolo “La defio vivi kaj krei” estis prezentita porokaze.



Alia libro prezentita en la kongreso, kiel en la antaŭa kazo tradukita de Miguel Fernández, estis “Tagoj kaj ruinoj”, taglibro de la historia kataluna esperantisto Jaume Grau Casas dum sia ĉeesto en la koncentrejoj por respublikanaj ekzilitoj en la sudo de Francio post la hispana enlanda milito. Temas pri impona eldono, je la zorgo de SAT-en-Hispanio. Ambaŭ libroj estas akireblaj en la Libroservo de tiu ĉi asocio.

Fine, oni memorigis pri la 80a datreveno de la Batalo de Teruelo, unu el la plej sangaj de la hispana milito, per prelego kaj gvidita vizito al la vestigiaj ankoraŭ survivintaj.

INAŬGURITA LA PLACO DE ESPERANTO EN TERUELO



Unu el la plej longdaŭraj spuroj kiujn lasos la kongreso estos la nomado de spaco en la urbo Teruelo kun la nomo “Placo Esperanto”.

La urbestro varme apogis la Kongreson, kaj ĝin inkludis ene de la celebrado de la 800a datreveno de la plej fama ama legendo en Hispanio, tiu pri la Geamantoj de Teruelo. Krome, ĝi akceptis doni la nomon Esperanto al place-to, en malferma spaco tre signifoplena, ĉar ĝi komunikas la kvartalon

San Julián kun la historia centro, kaj ĝi situas fronte al la loko kie komenciĝis la kursoj de la lingvo en la urbo. La formalan malfermon de la ŝildo kun la nomo partoprenis la skabeno pri kulturo, kiu emfazis tiun rolon de komunikado de la placo, analogan al tiu de nia lingvo.

La placo enhavas ankaŭ spacon por artaj pentraĵoj, kaj unu el la unuaj murgrafitioj temas ĝuste pri Esperanto. Multaj kongresanoj profitis la okazon por fotiĝi fronte al ĝi.



NOVAĴOJ EN HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO



La 24an de junio disvolviĝis en Teruelo la Ordinara Ĝeneral Kunveno de Hispana Esperanto-Federacio, laŭ la kunvoko sendita al la anoj.

Krom la necesa diskuto kaj aprobo de la informoj pri aktivadoj, raportoj pri spezoj kaj buĝeto, ni devas elstarigi la partan renovigon de la Estraro, per la elekto de nova kasisito, Jesús Miguel García Iturrioz, al kiu

la asocio dankas lian pretecon kunlabori en la laboroj de la asocio.

Estis aprobitaj ankaŭ la aliĝkotizoj por la venonta jaro, kiuj restas senŝanĝaj. Dum la Kunveno, kaj speciale por tiuj invititoj ne HEF-anoj, oni insistis pri la invito partopreni en la asocio, ĉar nur la komuna laboro kaj la helpo de ĉiuj esperantistoj gravas por la disvastigo de la lingvo kaj la prezento al la socio. Ni deziras denove rememorigi nian inviton, kaj la fakton ke nun la aliĝo estas pli facila danke al nia reta formularo.

SEMINARIO PRI LA JARO ZAMENHOF

La 26an kaj 27an de junio, post la fino de la Kongreso, disvolviĝis en la teruela sidejo de la Universidato de Zaragozo seminario okaze de la Jaro Zamenhof, kunlabore kun Universala Esperanto-Asocio (UEA).



La seminario estis inaŭgurita de Alberto Granados, José Antonio del Barrio kaj Sara Spanò (estrarano de UEA), kaj enhavis tre interesajn prezentadojn de: Carlo Minnaja, Roman Dobrzyński, Agnieszka Mozer, Vicente Manzano-Arrondo, José María Salguero, Saioa Escobar, Enric Baltasar, Xavier Alcalde, Irek Bobrzak kaj Miguel Fernández.

PREZENTITA “LA ZAMENHOF-STRATO” EN LA HISPANA

Krom la “Placo Esperanto”, alia “Zamenhof-strato” rolis dum la semajno de la Kongreso: okaze de la Jaro Zamenhof (la 100a datreveno de la morto de la iniciatinto de Esperanto), Hispana Esperanto-Federacio eldonis la tradukon al la hispana lingvo de tiunoma libro, kun la nomo “La calle Zamenhof”. Kiel sciante, la libro, verkita originale en la pola kaj en Esperanto, kaj jam tradukita antaŭe al aliaj 12 lingvoj, konsistas el la kon-



versado de la pola ĵurnalisto kaj movadano Roman Dobrzyński kun Ing. Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof, la nepo de D-ro. L.L. Zamenhof, kaj en ĝi oni traktas ne nur la personecojn de ambaŭ figuroj, sed ankaŭ la historiajn cirkonstancojn kiujn ili travivis en tiu turmenta tempo.

Oni profitis la kunmemoron kaj la kongreson por prezenti la libron al la ĝenerala publiko kaj al la esperantistoj, kun partopreno de la aŭtoro, Roman Dobrzyński, kiu venis al Hispanio danke al la helpo de la Pola Instituto pri Kulturo.

La unua prezentado al la ĝenerala publiko okazis la 20an de junio en Madrido, en la sidejo de la kulturinstitucio por la juda kulturo Centro Sefarad-Israel. Post baza prezento fare de Miguel de Lucas, Ĝenerala Direktoro de la Centro Sefarad-Israel, kaj Mirosława Kubas-Paradowska, direktoro de

la Pola Instituto en Madrido, la libron kaj la aŭtoron prezentis José Antonio del Barrio, prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, kaj poste Roman Dobrzyński parolis pri la ekesto kaj la enhavo de la libro.

Du tagojn poste, la libro estis denove prezentata en ĝenerala kunteksto en la urbo Zaragozo, en regiona institucio Biblioteko de Aragono denove kun ĉeesto de la aŭtoro, kaj prezento fare de la prezidanto de la aragona societo “Frateco”, Lorenzo Noguero.

La prezentado al la esperantistoj okazis dum la Hispana Kongreso de Esperanto, la 24an de junio en Teruelo. La eventon partoprenis alia reprezentanto de la Pola Instituto pri Kulturo, ties respondeculo pri lingvo kaj historio, Ernest Kowalczyk, kiu parolis al la ĉeestantoj en preskaŭ senriproĉa Esperanto.

La libro estas aĉetebla en la Libroservo de HEF, kontraŭ 17 eŭroj.

JUNULOJ MOVIĜAS



Diversaj renkontoj okazis en Teruelo, rilataj al la plej junaj esperantistoj. Unualoke, oni organizis la unuajn kunvenojn de la Organiza Teamo de la venontjara Internacia Junulara Kongreso, kiu okazos inter la 4a kaj 11a de aŭgusto 2018 en la ekstremadura urbo Badaĥozo (Badajoz), situanta tute apud la landlimo kun Portugalio, tuj post la fino de la Universala Kongreso kiu venontjare okazos en Lisbono.

Aliflanke, la 26an kaj 27an estis organizita Seminario por aktivula trejnado, organizita de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), ene de programo subvenciita de Eŭropa Unio, kun granda aprobo de la partoprenintoj.

Ĉar oni antaŭvidas pluajn sesiojn, krom aliajn aktivadojn por venontaj monatoj, se vi aĝas 30 jarojn aŭ malpli, ne hezitu kontakti kun la Junulara Asocio HEJS. Trovu la manieron tion fari ĉe <http://jovenes.esperanto.es>.

NOTINDA EĤO EN LA GAZETARO

Rimarkinda estis la informa efiko de la Kongreso. La lokaj komunikiloj informis ofte pri la renkontiĝo, jam dum la antaŭaj semajnoj, kaj ĉefe la ĵurnalo “Diario de Teruel” ĉiutage aperigis longajn artikolojn kun resumo de la aktivadoj, plus la tagan programerojn. Ankaŭ la lokaj radioj kaj la regionaj ĵurnaloj informis pri la Kongreso kaj eventuale intervjuis la prezidantojn de la loka kongresa komitato, Alberto Granados, aŭ de HEF, José Antonio del Barrio, kaj eĉ foje iujn partoprenantojn.

Sed la plej frapa gazetara rezulto estis la publikigo, la tagon post la inaŭguro, en tiu “Diario de Teruel”, de intervjuo al la poeto Miguel Fernández kaj de opiniartikolo verkita de José A. del Barrio, kiuj okupis la tutan dorsopaĝon, tute en Esperanto!; la lokaj legantoj povis trovi la tradukon en la hispana nur alirante la retejon de la ĵurnalo. Tiu estas verŝajne unuafoja tiuspeca publikigo en pro-

fesia normala gazeto.

KOMENCIĜAS PREPARLABOROJ POR LA KONGRESOJ 2018

Kiel ni jam anoncis, profitante ke la 103 Universala Kongreso de Esperanto okazos en Lisbono, diversaj aliaj esperantistaj eventoj estos organizataj en somero 2018 en la Iberia Duoninsulo, por ke vizitantoj povu profiti la vojaĝon kaj la okazaĵon.

Konkrete, la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) havos sian kongreson en

Madrido, de la 21-a ĝis la 28-a de julio 2018 (do ĝuste antaŭ UK en Lisbono). Parte koincide kun ĝi, inter la 20a kaj 22a de julio, okazos ankaŭ en Madrido la 77-a Hispana Kongreso de Esperanto.



En la komenco de septembro, profitante la viziton al Madrido de la respondeculo pri kongresoj de ILEI, Radojica Petroviĉ, oni formaligis la lokan organizan komitaton de ambaŭ kongresoj (vidu en la apuda foto), kaj oni komencis la pretigon de la necesaj laboroj. Oni vizitis la antaŭviditan kongresejon (studenta rezidejo Colegio Mayor Chaminade), kelkajn hotelojn kaj gastejojn serĉante kromajn loĝeblojn, respondeculojn pri internaciaj eventoj de la madrida urbestro, ktp. Estis skizita la enhavo, la programo, kaj aliaj detaloj. En venontaj semajnoj estos disponeblaj

la unuaj informoj, inklude de la kotiztabelo, la aliĝilo k.s., pri kiuj ni informos en venontaj numeroj de “Boletín” kaj en la retejo <http://www.esperanto.es/kongreso>.

Post la UK, inter la 4a kaj 11a de aŭgusto, okazos en la ekstremadura urbo Badajoz (Badajoz) la Internacia Junulara Kongreso, laŭ la decido de TEJO. Ankaŭ ĉikaze oni komencis pretigi la necesajn kondiĉojn, pri kiuj ni informos baldaŭ.

Dume, rezervu la datojn. Vi havos la okazon ĝui belan esperantistan etoson, intensan kaj por ĉies deziroj!

HEF

NEKROLOGE

La 29-an de aŭgusto forpasis Walter Máñez Cariñena, la plej veterana esperantisto en Cheste. Li estis naŭdek-du jara. Agrikulturisto sed ĉefe ekzemplodona esperantisto, lia persono kaj lia hejmo estis ĉiam malfermitaj al la esperantista mondo. Dum multaj jaroj li estis prezidanto de la esperanta grupo "Lumradio", fondita de lia onklo, la pioniro de Esperanto Francisco Máñez, kiu komence de la pasinta jarcento portis Esperanton al Cheste. Walter estis nomita tiel memore de unu el la aŭstraj infanaj rifuĝintoj gastigitaj en la urbo en la 20aj jaroj, post la Unua Mondmilito, pere de Esperanto kaj speciale danke al lia onklo.



Vi povas vidi foton lian (kun Rosa Zanón) en la raporto de la ĵurnalo "Las Provincias" antaŭ ok jaroj, fronte al lia domo kun ŝildo kun la verda stelo kaj frazo 'Tie ĉi oni parolas esperanton'.

La 30an de aŭgusto estos neforgesebla dato por amantoj de poezio kaj esperanta literaruro, ĉar ĉiuj geesperantistoj scias kiu estis Marjorie Boulton, kiu foriris por ĉiam, kvankam ŝi lasas kulturen heredaĵon kaj en la angla kaj en esperanto. Ŝi estis honora membro de UEA kaj akademiano. Ŝi meritas longan artikolon kaj pro manko je spaco en la nuna Boletín, ni verkos ampleksan tekston en venontan numeron por ĉiuj gelernantoj kaj por priskribi detale multajn aferojn pri ŝia brila verko.



Luis Serrano adiaŭis nin post longa laboro en Esperantujo. Li estis tre agema kaj laborema homo ĝis la lasta momento. Dum multaj jaroj li kunorganizis la Internacian Semajnon de la Kulturo kaj Turismo en diversaj apudmaraj urboj de Katalunio al kiuj aliĝis minimume pli ol cent homoj el kelkaj landoj.

Luis Serrano naskiĝis en Osomo (Palencia) en 1926 kaj estis ege aktiva esperantisto, grava organizando de la loka movado en la kataluna urbo Sabadell. Luis profesie estis masonisto. Li esperantiĝis en 1953 pere de “Kurso per korespondado” gvidita de Ramón Mole-
ra Pedrals. Li translokiĝis al Asturio (Aviles kaj Hîhono) en la jaro 1954 kie li ekaktivis loke. Poste li elmigriĝis al Germanio kaj pli poste al Francio, dum entute tri jaroj. Li edziĝis al esperantistino el Sabadell kaj translokiĝis al tiu urbo, kreante esperantan familion.



Dekomence li estis aktiva, dum multaj jaroj li apartenis al estraro de Sabadell Esperantista, poste Centro de Esperanto Sabadell, kie li estis sekretario, kursgvidanto, respondeca pri libro-servo, kaj ankaŭ li okupiĝis pri la kurso per korespondado, organizis programojn, verkis artikolojn por pluraj Esperanto-gazetoj. Li estis premiita en Konkurso de Intervjuoj (1965) en la kadro de la 7a Barcelona-Provinca Esperantista Renkontiĝo okazinta en Molins de Rei. Luis Serrano kunfondis la Pacifisman Esperantistan Asocion “Antón Balagué”, kiun li mem prezidis, kaj redaktis ĝian dumonatan organon ekde ĝia fondiĝo, sekve li estis ĝenerala delegito de Mondpaca Esperantista Movado en Hispanio. Dum multaj jaroj, ĝis aŭtuno 2015, li estis la redaktisto de la revuo "Internaciisto", organo de Internacia Komunista Esperantista Kolektivo. Li ankaŭ kunfondis “Kulturan Asocion Esperantistan” (KAE) kaj estas unu el ĝiaj estraranoj dum multaj jaroj, inter alie redaktante ĝian organon. Li estis peranto de pluraj esperantistaj gazetoj kaj dum iom da tempo zorganto de la Libroservo de HEF. Krome, li estas unu el la ĉeforganizantoj de la Internaciaj Esperanto-Semajnoj de la Kulturo kaj Turismo.

(Wikipedia)

POEZIA ANGULO

En la akvo gvadiana ⁽¹⁾

El la hispana tradukis Jorge Camacho

En 2018 la Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazos en la ekstremadura ⁽²⁾ provinca ĉefurbo Badaĵozo ⁽³⁾. Vivinte en ĝi inter 1968 aŭ 1969 kaj 1976, mi elektis por traduko poemon de la tiea verkisto Javier Feijóo (1960). Tiu ĉi traduko aperas samtempe en *Boletín de Hispana Esperanto-Federacio* kaj en *Beletra Almanako*.

En la akvo.

Viaj pontoj
en la akvo!

Pontoj oldaj,
pontoj novaj
en la akvo.

Viaj muroj
kaj pordegoj
en la akvo.

Puerta Palmas ⁽⁴⁾
en la akvo.

Aŭtovojoj
spgulbilde
sur la akvo.

Viaj batoj
sonorilaj
kun bobeloj
en la akvo.

Viaj kirkoj,
viaj kredoj
kaj mortintoj
en la akvo

En la akvo
viaj gaĝoj ⁽⁵⁾
kaj ciganoj.
Homoj riĉaj
kaj paŭperaj ⁽⁶⁾
en la akvo.

La najbaroj
kaj la limoj
en la akvo.

En la akvo
la teatroj,
teatristoj.
Viaj farsoj
kaj farsuloj
en la akvo.

⁽¹⁾ Gvadiano: (hispane *Guadiana*) rivero en Ekstremaduro, parte nekontinua, trafluanta Badaĵozon.

⁽²⁾ Ekstremaduro: (hispane *Extremadura*) hispana regiono angule inter Andaluzujo kaj Portugalujo; oni ne konfuzu Ekstremaduron kun la antikva portugala provinco Estremaduro (portugale *Estremadura*)

⁽³⁾ Badaĵozo: (hispane *Badajoz*) mi preferas esperantigi hispanlingvajn vortojn per modifite grafisma asimilo, laŭ kiu *j* en ĉiuj pozicioj, kaj *g* antaŭ *e* kaj *i* estu redonitaj ne per *ĥ/h* (fonetisme) nek per *j* kaj *g* (grafisme) sed per *ĵ* kaj *ĝ* respektive, ĉu pro etimologio aŭ pro internacieco kaj kongruo kun la lingvoj najbaraj al la hispana kiel la galegportugala, kataluna, franca ktp (kp kun *donjuán* = *donĵuano*).

⁽⁴⁾ Puerta (de) Palmas: nomo de pordego en Badaĵozo ĉe samnoma ponto super Gvadiano.

⁽⁵⁾ gaĝo: (el la franca *gadjo*, hungara *gádzsó* k.a., siavice el la cigana *gagé* [pr. gaĝe]; en la E-vikipedio, *gadĵo*) necigano (kp kun *goĵo*); la formon *gaĝo* ĉi-signife en Esperanto uzis Sergio Franzese en *La cigana literaturo (Literatura Foiro, n-ro 112, 1988, p. 24)*, referencita de Bernard Golden en *La neologismo "gaĝo" – kontribuaĵo al la Esperanta slango (Starto, n-ro 156, 1993/3, p. 16-17)*. Kvankam, kiel mencias redaktista noto fine de la artikolo de Golden, “jam penetras en Esperanton la propra nomo de la cigana etno, *romao*, dum la vorto *cigano*, donita al ili de Eŭropanoj, estas ĉiam pli sentata kiel ofendo kaj tial rifuzata”, en la traduko mi tamen lasas *cigano* ĉar: 1) la hispana *gitano* ne nepre havas pejorativan sencon; 2) okazas same pri la esperanta *cigano* (ekzemple, mi ĵus legis ĝin en la 500-paĝa traduko *Tagoj kaj ruinoj*), kies signifo, cetere, strikte pli vastas ol tiu de *romao*.

⁽⁶⁾ paŭpero: (el *paŭperismo*) malriĉulo.

La rigardoj,
okulsignoj ⁽⁷⁾
en la akvo.
Decidistoj ⁽⁸⁾
dormiĝintaj
en la akvo.
Kaj plenvekaj ⁽⁹⁾
decidistoj
en la akvo.

La poetoj
kaj artistoj
en la akvo.

En la akvo
la Lencero'j
kaj Valhondo'j
kaj Pacheco'j ⁽¹⁰⁾
en la akvo.

En la akvo
viaj palmoj.
Carolina'j ⁽¹¹⁾
kun anasoj
kaj kolomboj
en la akvo.
Kaj Chamizo'j ⁽¹²⁾
kaj Naskiĝo'j ⁽¹³⁾
en la akvo.

En la akvo
la gitaroj
kaj bru-festoj.

⁽⁷⁾okulsigno: okulmovo (fermo de unu okulo) por signi al iu ion, kion oni ne povas pli klare esprimi (kp kun la PIVaj *ŝingrosigno*, *kapsigno* kaj *mansigno*); uzebla ankaŭ figurasence; formo preferinda al la PIV-Suplementa *palpebrumo*, kiun oni prefere uzu por rapida fermo kaj malfermo de ambaŭ palpebroj (laŭ la unua senco en PIV), kaj al *okulumo*, kiu plu signifas ŝeton de avida kaj amdezira rigardo al iu (same).

⁽⁸⁾decidisto: pro silabnombro mi devis elekti ĉi vorton anst. la traduke plej fidela sed 5-silaba *politikisto*, ĉar kaj *elektito* kaj *postenulo* montriĝis iom ĝene svagaj kaj ambiguaj.

⁽⁹⁾veka: en stato simila al tiu de vekiteco (sen ke io aŭ iu aktive vekis); kp kun *aperti/aperta*, *dubi/duba*, *falsi/falsa*, *fiksi/fiksa*, *fuŝi/fuŝa*, *kaŝi/kaŝa*, *konfuzi/konfuza*, *kompliki/komplika*, *korekti/korekta*, *suspekti/suspekta* k.a.

⁽¹⁰⁾Pluraligo de la familiaj nomoj de tri ekstremaduraj poetoj, Luis Álvarez Lencero (1923-1982), Jesús Delgado Valhondo (1909-1993; pr. balondo) kaj Manuel Pacheco (1920-1998; pr. paĉeko), al kiuj la urbo Badaĵozo dediĉis la monumenton *La tri poetoj*, de la statuisto Luis Martínez Giraldo (1948), ĉe la bordo de Gvadiano.

⁽¹¹⁾Statuo de la poetino Carolina Coronado (1820-1911; pr. karolina) en la parko Castelar.

⁽¹²⁾Pluraligo de la familia nomo de la ekstremadura poeto Luis Chamizo Trigueros (1894-1945; pr. ĉamiĉo), kiu verkis kaj en la hispana kaj en la ekstremadura dialekto aŭ lingvovarianto nomata *castiŭo*.

⁽¹³⁾*La nacencia* (La naskiĝo) estas la titolo de poemo de Chamizo verkita en *castiŭo*.

Kaj Porrina'j⁽¹⁴⁾
en la akvo.

En la akvo
Karnavalo⁽¹⁵⁾
ĉiutage.

La foiro
Sankt-Johana,⁽¹⁶⁾
Al-Mossasa⁽¹⁷⁾
en la akvo.

La geavoj
en la akvo.
Kaj gepatroj
kaj gefiloj.
Niaj idoj
en la akvo.

En la akvo
la kvartaloj
kun la stratoj
kaj la homoj.
Niaj homoj
en la akvo.

En la akvo
l' historio.
En la akvo,
tuta vivo.
Nia vivo,
en la akvo.

En la akvo
gvadiana:
Badaĵoz'!
Kun vizaĝo
el profiloj
ondiĝantaj
reflektiĝe
sur la akvo.

En la akvo!
Spegul' nia
en la akvo
gvadiana.
En la akvo!

José Feijóo

(14) Porrina de Badajoz (t.e. el Badaĵozo) estis la artista nomo de José Salazar Molina (1924-1977), cigana flamenkokantisto; flamenko: nomo de probable cigandevenaj muziko, kantado kaj danco tipaj de Andaluzujo.

(15) Renomas la badaĵoza Karnavalo (iam en Februaro aŭ Marto).

(16) Fine de Junio.

(17) Al-Mo[a]ssasa Bataljaŭs (laŭ la araba vorto] *مَوْسَسَا* *mu'assasa*): la fondo de Badaĵozo) estas la nomo de festo (fine de Septembro) celebranta la fondon de la urbo en la jaro 875 fare de andalusa militestro; Andalusio: nomo de la teritorioj sub arab-islama regado en la ibera duon-insulo inter la jaroj 711 kaj 1492 (oni ne konfuzu ĝin kun la nuntempa regiono Andaluzujo).

La 90-a SAT-KONGRESO 29. 7. - 5.8. 2017



Ĉi-jare la unuan fojon, la SAT-kongreso okazis en Azio. Post la impona 102-a UK en Seulo 105 kamaradoj el 16 landoj ĝuis la 90-an SAT-kongreson en apudseula urbo

Gimpo, proksime de la bordo ĉe la Flava maro. Ĉefe la azianoj havis ŝancon konatiĝi kun alilandanoj, praktiki la lingvon kaj sperti la SAT-etoson. Junaj japanaj partoprenantoj tre aprezis personan kontakton kun esperantistoj el diversaj landoj.

Koreanoj bonvenigis nin per rideto, varma koro, frateco, amikeco kaj malfermitaj brakoj. Ni loĝis en komforta hotelo *Yakam*, kie okazis la antaŭviditaj programeroj. Krome, je dispono al la kongresanoj estis senpaga aliro al kuracaj banakvoj. Tion pluraj el ni profitis ĝissate.

Ĉe la alveno, post la registriĝo kaj ricevo de la kongresmaterialo ĉiuj partoprenantoj povis elekti (laŭ sia grandeco) verdan T-ĉemizon kun surskribo: "SAT-tutmonda solidareco". La kongresa temo estis: "Demokratio en nuntempa mondo". La semajna programo estis klare afiŝita sur apartaj paneloj kaj ankaŭ la kongreslibro en pli granda formato ol kutime (A4) enhavis ĉiujn necesajn informojn. Sabate dum la interkona vespero prezentiĝis du muzikbandoj de la "Paca agado sur strato".

Dum la malfermo Vinko Markovo donis informojn pri SAT al la novuloj. Post la salutvortoj de PK kaj OKK sekvis salutoj de kelkaj organizoj: Rob Moerbeek salutis nome de UEA, Dieter Rooke nome de komunistoj, Franciska Tubale nome de Radio Melbourne kaj mi nome de fervojistoj. Malantaŭ la hotelo ni fotiĝis ĉe grandega banderolo kun E-slogano "Se ni kune songas kaj praktikas, Alia Mondo Eblas!" Tuj poste sekvis prelego pri kandelluma revolucio, kiu sukcesis forigi la prezidantinon de Koreio. Posttagmeze en la sama tono daŭris parolado pri: "Multitudoj kaj absoluta demokratio". Interesan sciencfikcian prognozon pri evoluo de Guglo kaj ĝia pasporto prezentis Hiongun KIM. Li kaptis intereson de la aŭskultantoj.

Vespere ni ĝuis belegan folkloran prezentadon de la ensemblo "Espera Mondo". Sonis diversaj, al kelkaj el ni, nekonataj instrumentoj kaj tamburoj. Ĉe la fino ni povis kunkanti la faman kanton *Ariari*, muziki kaj danci kun la bele vestitaj aktoroj. Ĝojo kaj rido invadis ĉiujn ĉeestantojn.

Ekde lundo komenciĝis kutimaj SAT-programeroj: estis prezentitaj agad- kaj jar-raportoj. Okazis diversaj diskutoj, konferenco pri unuiĝo de la du koreaj ŝtatoj, laborkunsidoj kaj kunvenoj de frakcioj - liberecana, vegetara, komunista, sennaciista, verdula, liberpensula.

Inter prelegoj elstaris tiu pri "Nuklea akcidento en Fukuŝima" prezentita de Hori Jasuo. Pri antropologio, kartografio kaj koloniismo prelegis Guilherme Fians el Brazilo. "Enrigardon al la korea literaturo" prezentis Rob Moerbeek. Pri "Koreaj lingvo kaj historio" prelegis Ho Song. Pri "Esperanto kaj klasikaj lingvoj" donis informojn Saioa Escobar. "La rusan revolucion 1917" rememorigis Dieter Rooke. Pri "Pejzaĝo kaj ĝia influo sur nin" kaj belegajn bildojn prezentis Maria Butan el Rumanio.

Pri sia domo en Kreto parolis Annie Grente. Pri siaj spertoj rilate veganismo parolis Paŭlino Gaborit. Pri "La memoro de E-movado" pri Eduardo Vivancos, nuntempe 97-jaraĝa parolis Xavi Alcalde, "Notojn pri monda kapitalismo" skizis Miyazawa Naoto el Japanio. Pri ĉina Tajpeo por Tajvano ni eksciis de Albengo. Pri "Fak-laboro en Fejsbuko" informis Neil Blonstein. Tradukan laborgrupon gvidis Annie Grente. Ege bela ateliero montriĝis pri kreado de mandaloj per sablo. Hori Jasuo muzikis per diversaj malgrandaj muzikiloj akiritaj dum liaj multnombraj vojaĝoj. Ni eksciis pri la eldona fako kooperativa. De Alberto Calienes ni ricevis informojn pri Kubo kaj de Alfonse Waseka pri la Demokratia Respubliko Kongo.

Kulturaj vesperoj estis dediĉitaj al muzikprezentoj, kantoj kun gitaro kaj revoluciaj kantoj. Belan koncerton prezentis la litova ensemblo "Sepa kaj Asorti". Kun scivolemo ni spektis teatran komedion "La malfermilo" prezentita de Saŝa Pilipoviĉ kaj Franciska Toubale. Spektinda estis ankaŭ aŭkcio de esperantaĵoj iniciita de Tahira Masako (nomata Masakato). Estis kolektitaj pli ol 300 eŭroj por la SAT-movado. Dum la distra vespero ni ĝuis korean operon *Ariari* de la familio Lee Eunwoo. Japanan Te-ceremonion prezentis Huzimoto Hideko.

Interesaj ekskursoj gvidis nin al diversaj lokoj de la lando.

Belega estis tiu al *Buyeo*, kie ni vizitis admirinde ravan lotusan ĝardenon kaj poste muzeon kaj templon. Alia, ne malpli interesa montriĝis la "Paca observejo", en *Ganghwa* insulo, kie ni estis plej proksime al Norda Koreio, situanta trans la rivero Han. En la samloka muzeo multaj papermesaĝoj atestis pri deziro reunuiĝi. Plie ni vizitis fortikaĵon kaj la plej malnovan templon de Koreio.

La lastan tagon, dum la kvara laborkunsido, estis ellaboritaj kaj prezentitaj Gvidrezolucio kaj Deklaracio. Vespere okazis fermo de la kongreso kun donacoj kaj dankoj pro sindonema laboro fare de la organiza teamo. Ĉe la fino Saŝa Pilipoviĉ prezentis la venontjaran urbon Kragujevac en Serbio, kie okazos la 91-a SAT-kongreso de la 5-a ĝis la 12-a de aŭgusto 2018; la OKK transdonis al li la flagon.

La ĉi-jara kongreso estis riĉa el movada, kultura, distra, kaj turisma vidpunktoj. Abundis interesaj prelegoj, konversacioj, belaj momentoj kaj homa interkompreniĝo.

Liba Gabalda

ĈU LA HISPANA TURISMO ESTAS DAŬRIPOVA?

Kiel sciante Hispanio estas turisma lando, kiu situas sin inter la tri plej vizitataj de la mondo. Agrabla klimato, bonkvalitaj strandoj, multflanka arta kaj kultura heredaĵo, sekve de diversaj civilizacioj kiu lasis siajn spurojn en la lando, situas Hispanion kiel unu el la tri mondaj celoj por feriumi.

Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj aprobis per Rezolucio de la 4-a de decembro 2015, la decidon nomi la jaron 2017 *Internacia Jaro de Daŭripova Turismo por Evoluigo*. La Rezolucio rekonas “la gravecon de la internacia turismo, kaj specife la nomumon de internacia jaro de Daŭripova Turismo por Evoluigo por pli bone stimuli la interkomprenon inter ĉies popolo, preni konsciencan pri la diversa riĉeco de la heredaĵo de multaj civilizacioj kaj rimarki la valorojn de la diversaj kulturoj, helpante, samtempe, la pacon en la mondo”.

Tiel, tiu decido de Unuiĝintaj Nacioj montriĝas ege oportuna por garantii la tri pilierojn de la daŭripovo, nome, ekonomian, median kaj socian. Tiu grava agnosko alvenas ĝustatempe, kiam la internacia komunumo adoptis la “Agendo 2030”, kaj la “Celoj por Daŭripova Evoluigo” de 2015, kaj la disvolvo de daŭripova turismo povas esti efika rimedo en la streboj de pluraj el tiuj celoj.

Pro tio UEA decidis ke la Universala Kongreso de Esperanto okazinta ĉijare en Seulo, havu kiel kongrestemon “*Turismo kaj Evoluo: Vojoj al daŭripovo*”.

Laŭ Monda Turisma Organizaĵo (MTO), kies sidejo estas en Madrido, Hispanio estas la unua turisma lando de Eŭropa Unio, kies turisma trafo komenciĝis en la sesdekaj jaroj de la pasinta jarcento kaj plifirmiĝis internacie per la festado de la 5-a centdatreveno de la malkovro de Ameriko, de la Olimpiaj Ludoj en Barcelono kaj de la Universala Ekspozicio de Sevilo. Laŭ la enspezoj per turismo, Hispanio estas la dua lando en la mondo post Usono. La plej vizitataj lokoj estas Kanariaj Insuloj, Balearoj, Katalunio, Suna Marbordo, kantabra Marbordo, galegaj estuaroj kaj “Picos de Eŭropo”, neforgesante la Vojon de Santa Jakobo aŭ lokajn festojn kiel tiujn de Pamplona. Dum jardekoj, la plej altira allogaĵo estis la suno kaj strandoj, sed lastatempe pligrandiĝis la kultura turismo al celoj kiel Ekstremaduro aŭ Kastilio kaj Leono.

Sed ĉu nia turismo estas daŭripova? Daŭripovo estas agmaniero kiu kontentiganta la postulojn de la nuna tempo, povas daŭri ankaŭ en la estonto sed endanĝerigi la eblecojn de la sekvontaj generacioj. Temas pri kompleksa koncepto, kies kerno estas la strebado al inda vivkvalito por ĉiu homo, sur ĉiu nivelo: loka regiona kaj tutmonda.

La daŭripova turismo naskiĝas pro la plia konscio pri la mediaj temoj kaj pro la fakto ke la turisma merkato ekkonscias pri la monprofito de tiuj aktivaĵoj. Samtempe, la turistoj postulas pli kaj pli da kvalito en la servoj kaj la ekologistaj movadoj premas la publikan opinion rilate la efikojn de la turismo sur la mediaj sekvoj.

Amasa turismado ofte alportas nocadon de la medio. Negativaj trafaj estas i.a. la netaŭga uzo de fajro en arbaraj areoj, la dehako de arboj, la troa akumulado de rubaĵoj, la troa trafiko kaj detruo de vivmedio de bestoj kiel birdoj, kaj eĉ la uzo de trudherbicidoj, ĉefe en golfejoj. Al tio ni aldonas la poluadon de maraj kaj nesalaj akvoj. Sed samtempe turismo ankaŭ havas pozitivajn efikojn kiel kreon de dungiteco, ekonomian enspezojn, plibonigon de la kultura nivelo de la loĝantaro kaj kulturajn interesanĝojn inter turistoj kaj la lokaj enloĝantoj.

Eble ankoraŭ nia turismo ne estas plene daŭripova, sed la Forumo pri Daŭripova Turismo kaj la Teknologia Hotela Instituto promocias efikecon per projektoj pri esploro kaj evoluo. Aliflanke, Hispanio havas pli ol 30 naturajn protektitajn areojn, laŭ la Eŭropa Ĉarto de Daŭripova Turismo. Tiu ĉi Ĉarto, de 1999, ekvalida en 2001, celas la gardadon de la protektitaj areoj de Eŭropo, kiel fundamentan parton de eŭropa heredaĵo por ni kaj por estontaj generacioj. Ekde la valideco de tiu Ĉarto estas konfirmitaj 80 protektitaj areoj en Eŭropo, el kiuj 30 estas hispanaj, pro tio nia lando ĝenerale garantias daŭripovon.

Se al tio ni aldonas la reton de Naciaj parkoj, rezervejoj de la Biosfero, entute 45 laŭ Unesko, la humidejoj internacie gravaj (Doñana, Daimiel) ktp. kaj la maraj protektitaj areoj, ni konkludas ke Hispanio sufiĉe bone gardas daŭripovon.

Do, turismo estas grava socia fenomeno kiu implikas i.a. transporton, loĝadon, nutradon, kun la celo uzi libertempon por ripozo kaj aliaj diversaj kulturaj eblecoj. Turismo, ĉefe internacia, havas kiel rolon alproksimigi popolojn kaj kulturojn kaj, kiel finan celon, kontribui al konservado de la paco.

Rafaela Urueña



LA 102-A UK DE ESPERANTO EN SEULO

22-29/7/2017

Kun granda timo vojaĝi al ege fora lando Suda Koreio, mi prenis mian bagaĝon kaj



flugis rekte de Madrido al Seulo. Ĉe la flughaveno, grupeto da korea junaj geesperantistoj kun naiva rideto kaj sincera ĝojo atendadis la alvenantojn el diversaj landoj. Mi profunde spiris, ĉar mi timis troviĝi sola en tiu grandega flughaveno, sed mia surprizo estis kiel ĉiela donaco. Simpatia knabo, kiu estis komencanto, sed sufiĉe bone regis la lingvon, akompanis min ĝis mia hotelo, kiu estis tre komplike atingebla per trajno kaj metroo. La hotelo estis ankaŭ komplika afero, ĉar en la akceptejo mi devis paroli per gestolingvo kaj kelkajn vortojn en la angla. Danke al mia kolego Carlos, ĉio rapide solviĝis, sed la afero estis pli facila ol la uzado de la speciala aparato, kiun mi ricevis por

ŝalti kaj malŝalti ĉion: televidon, lumojn, klimatizilon, ktp. tamen la ĉambro estis luksa, pura, komforta kun senpagaj boteletoj de akvo kafo, teo, biskvitoj; pri tio mi ne plendas.



Hankuk Fremdlinga Universitato estis la kongresejo, sufiĉe proksima por atingi ĝin piede sub la varmega kaj tre humida vetero, sed agrabla promonado tra la bunta strato, plena je simboloj, restoracioj, vendejoj kaj agrablaj homoj, kiuj rigardis min kun "surprizo", ĉar Seulo ne estas tre turisma urbo por

Gesperantistoj el 61 landoj, ĉefe el Azio, kolektiĝis kun amika etoso, kaj mi havis la okazon saluti kelkajn dekojn da Fejsbuk-kontaktoj, multaj el ili alvenis al mi por memfotiĝi kaj konfirmi nian amikecon ktp.

La ĉefa enirhalo estis sufiĉe granda salono, kie oni povis ĝui ekspozicion kun pli ol cent belaj fotoj pri diversaj kongresoj kaj Zamenhofaj temoj, kaj kompreneble, la akceptejo kaj aliaj budoj por informado kaj aĉetado de poŝtmarkoj kaj aliaj esperantaĵoj.

Bedaŭrinde pluvis dum la inaŭguro, sed neniu homo restis ĉe sia hotelo, ĉar la prezo de taksioj estis relative malmultekosta kaj la malfermo sukcese realiĝis.

La Movada Foiro okazis kiel kutime, amuze kaj kun amaso da homoj, kiuj interesiĝis pri kongresoj, libroj, diversaj varoj el kelkaj landoj, sed pro la pluvo ni devis fermi kelkajn minutojn pli frue, tamen ĉio iris bonorde.

Sur la dua kaj tria etaĝoj en diversaj ĉambroj okazis variaj sesioj, kunvenoj, ktp. Ne mankis la KER ekzamenoj. *Teo kaj Amo* proponis teon al ĉeestantoj kaj aljuĝis premiojn (diplomojn) al kelkaj partoprenantoj de la konkurso pri filmoj, kelkajn el kiuj ni spektis. Krom la du kunsidoj de komitatanoj, mi ankaŭ ĉeestis la Korean Kulturĉambrom kie oni memornamis ventumilojn per buntaj sekigitaj floretoj, dancado pri folklorkulturo de Koreio, kaj por la dikredantoj kunvenis IKUE-KELLI kaj Oomoto.

Estus tre longe skribi liston de la pluraj kunvenoj kaj la neforgeseblaj ekskursoj tra la belega kaj alloga lando, ĉefe la historiaj kvartaloj kaj temploj kaj la naturo de Koreio.

Restoracioj estis relative malmultekostaj, simile al Hispanio, sed la manĝoj tute malsimilaj, tamen sanaj kaj ege bongustaj. Mi kuiras hejme kelkajn receptojn, ĉar mi ege ŝatis ilin.





Kompreneble, okazis la jam kutima futbalmatĉo, ĉi foje, la afero estis tre amuza, ĉar granda grupo da homoj eliris el la kongresejo kvazaŭ strata manifestacio kun tamburado, portante flagojn kaj por la unua fojo, nia teamo venkis 1-0.

Mi ne devas forgesi la muzikistojn kiel: *Kajto* (kvarope), *Ĵomart kaj Nataŝa*, *Asorti* kaj aliaj, kiuj


koncertis dum vesperaj kulturaj programeroj. Ne mankis teatraĵo, koreaj tradicioj kaj simfonia orkestro *Arirang*. Bedaŭrinde mi ne havis tempon spekti ĉion, ĉar ne eblas ĉeesti samtempe en du lokoj, sed mi profitis la tempon.

Kvankam mi ne ĉeestis, unu el la plej gravaj eventoj, estis la Internacia Pontkunveno, okazinta en la Parlamentejo pri la Unuiĝo de la Korea Duoninsulo, kun ĉeesto de 130 homoj el 21 landoj.

Kiel kutime, mi ne notis multajn okazaĵojn, sed pli malpli mi faris resumon pri la plej gravaj programeroj de la neforgesebla 102-a Universala Kongreso de Esperanto.

La venonta okazos en Lisbono (Portugalio) kaj la sekvaj okazos en Lahti, Finnlando 2019 kaj en 2020 en Montrealo, Kanado. Ni devas multe enspezi por ĝui la esperantajn festojn.

Ángel Arquillos



IV. KIE ONI RAKONTAS NOKTAN AVENTURON KAJ LA MALSANOJN DE LA SERVISTINO

Sub la domo estis malseka kaj kvadrata kelo. El ties kvar muroj pendis disaj eroj de dispecigitaj animaloj: kruroj, kapoj, flugiloj, bekoj, vostoj, kornoj, hufoj ktp., kvazaŭ temas pri restaĵoj el la laboro.

Kaj ne estis pli.



Unu nokton eniris blanka kato en la domo kaj ŝtelvenis en la kelon. Li ekvagadis en la malhelo kaj ne trovis la elirejon. Li ekgrimpis la muron kaj trafis la unuan rubrestaĵon. Sentinte tuŝon de plumoj li lanĉis miaŭnon kaj snufon kiu vekis la majstron kaj Alfanhuí.

Ambaŭ malsupreniris al la kelo kun lanterno, kaj trovis la katon, kiu havis en la buŝo kolon de cigno, kun ties kapo kaj tuto. La cignokolo tordiĝis kvazaŭ ĝi vivas kaj ĝi bekofrapis kontraŭ la frunto de la kato ĉar tiu premis ties tendenojn, kaj ĉar li timis, li ne kapablis delasi ĝin. La kato ĵetiĝis per grandaj saltoj kontraŭ la murojn kaj produktis flavajn sparkojn gratante siajn ungojn kontraŭ la ŝtonojn. La majstro signalis al la servistino ke ŝi kaptu la katon. Li malsuprenigis ŝin sur siaj brakoj ĝis la kelo ĉar per radoj ŝi ne kapablis malsupreniri sola. La servistino kaptis la katon senhezite, kaj tiu delasis la cignokolon kaj mordis ŝin je pulso. La pulso sonis je pergameno kaj la servistino ne emociiĝis. La majstro reprenis ŝin surbrake kaj li suprenigis ŝin al la domo. Ĉiuj revenis litten, kaj la servistino kuŝiĝis sen delasi la katon, kiu baraktis la tutan nokton. La venontan matenon la servistino estis tute ruinigita. Ŝi havis la haŭton de la brakoj, de la brusto kaj de la

kolo gratita kaj disŝirita kaj estis elirinta ŝia remburo.

El la kato ili faris ŝnurojn por pendolhorloĝoj; el ties ungoj, gratilon por kombi felojn; el ties skeleto, kaĝeton por musoj, kaj el la haŭto, ili fabrikis tambureton kaj kuracis la servistino. La majstro remetis la kotonaĵojn kaj kudris flikaĵojn el la katohaŭto, ankoraŭ freŝa. Li poste tanis la flikaĵojn sur la korpo mem de la servistino. Ili remburis el la kato nur la kapon kaj ĝin ekspoziciis en la montrofenestro.

Al la servistino tuj sekiĝis tiuj flikaĵoj kaj ŝi resaniĝis. Sed alian tagon ili forgesis ŝin subpluve kaj ŝi moliĝis. Ŝi ankaŭ resaniĝis el tio, sed restis pli seka kaj kuntirita. Iom poste ŝi malsaniĝis pro iktero kaj ŝi tute verdiĝis.

Tiele la servistino iris el malsano en malsanon, ĝis unu tagon ŝi mortiĝis. Alfanhú kaj lia majstro enterigis ŝin en la ĝardenon sub tomboŝtono gravurita per vinagro kie oni skribis:

SINDONEMA KAJ SILENTEMA

V. PRI KIEL ALFANHUÍ SUKCESIS EKBRULIGI LA FAJRON KAJ LA LONGA HISTORIO KIUN LA MAJSTRO RAKONTIS AL LI

Post la morto de la servistino, oni ne rebruligis la fajron. La majstro restis trista, kaj Alfanhú ne kuraĝis diri ion ajn. Sed unu tagon li vidis lin kvazaŭ suferinta malvarmon kaj li demandis:

-Ĉu vi volas ke mi bruligu al vi fajron, majstro?

La majstro momente surpriziĝis kaj poste jesis. Alfanhú bone konis la lignon. Li konis la lignaĵojn kiuj faris tristajn flamojn kaj tiujn kiuj faris ĝojajn; tiujn kiuj fortajn kaj malhelajn fajrojn, tiujn kiuj helajn kaj dancemajn, tiujn kiuj lasis inajn braĝojn por varmigi la dormon de la katoj, tiujn kiuj lasis virajn braĝojn por la ripozo de la ĉashundoj. Alfanhú estis lerninta koni la brullignon ĉe sia patrino, kie same oni bruligis fajron, kaj li eksciis ke la fajro de sia majstro estas kiel la fajro de la patrinflankaj onkloj, de la veturantoj kiuj alvenis vestitajn je grizo. Tiele alvenis Alfanhú kun fasko de selektita ligno kaj ekbruligis la fajron. La majstro kontemplis lin el sia seĝo. Li vidis lin kaŭra ĉe la kameno, atenta al lia laboro, rigardis liajn trankvilajn okulojn de malvarma trielo; li vidis, finfine, kiel ekbruliĝis, viva kaj ĝaja, la unua flamo de Alfanhú kaj ekbriliĝis liaj pupiloj kaj rideto ĉelipe. Li poste diris:

-Neniam mi pensis, Alfanhuí, ke vi alvenos akompani min. Por via unua fajro, Alfanhuí, mi rakontos al vi mian unuan historion.

Kaj li multe emis ripeti la nomon de Alfanhuí ĉar estis li kiu estis kreinta ĝin. Poste li ekrakontis.

- Kiam mi estis infano, Alfanhuí, mia patro fabrikis olelampojn. Li laboris la tutan tagon, kaj li faris ferajn pendolampojn por la kabanoj kaj lampojn el orumita latuno por la palacoj. Li faris milojn kaj milojn da tipoj de diferencaj lampoj. Li havis ankaŭ la plej bonkvalitajn librojn kiuj estis verkitaj pri lampoj. En unu el ili oni parolis pri la "vejnoŝtono". Tiu estis ŝtono kiu ŝajne estas durega, sed porenhava kiel spongo, kaj kiu havas la grandon de ovo kaj la formon de migdalo. Tiu ŝtono havis la kapablon trinki ĝis sep ĵaregojn da oleo. Oni lasis ĝin en ĵarego kaj la venontan matenon la tuta oleo estis malaperinta kaj la ŝtono havis la saman grandon. Kiam ĝi estis trinkinta sep ĵaregojn, ĝi jam ne volis pli. Tiam oni metis al ĝi nur meĉon kaj ekbruligis ĝin por ke ĝi havigu flamon blankan kiel lakto, kiu daŭris eterne. Kiam oni volis, ĝi povis ankaŭ malbruliĝi. Sed se oni volus denove la oleon, nur strigo scipovis elpreni ĝin, ĝis lasi la ŝtonon sekega kiel antaŭe. Mia patro ĉiam parolis pri tiu ŝtono, kaj li nenion estus dezirinta en la mondo tiom kiom havi ĝin. Mia patro kutimis sendi min al la vojoj por ke mi lernu la kolorojn de la aferoj, kaj mi malfruis multajn tagojn por reveni.

»Unu tagon mi eliris por unu de miaj veturoj. Mi portis bastoneton surŝultre, kaj ĉe la bastonpinto, tukon kun pikniko. Mi iris laŭ kalka vojo inter montetoj da polvo, sen herbo, kun apenaŭ kelkaj sekaj arboj kie haltis la pigoj. Estis en la kamparo ankaŭ multaj truoj kaj ĉifonoj kaj rompitaĵoj el koto, kaj radoj kaj restaĵoj el ĉaro kaj alia senfino da rubaĵoj, ĉar ĉio kio rompiĝis estis forĵetita tien. Apenaŭ neniu iris tra tiu vojo ĉar tiu estis tago de multa suno, kaj la suno estis tie tre forta, kvankam ankoraŭ ne estis veninta la somero.

»Malproksime mi vidis figuron sida sur unu ŝtono, ĉe la vojo. Alveninte mi vidis ke temas pri almozulo kiu diris al mi: "Donu al mi el via kolazono".

»Li faris por mi lokon sur la ŝtono kaj ni ekmanĝis. Tiam mi vidis kiel li estas. Li vestis malhelan pantalonon, ĝis meza suro, kaj brunan veŝton, el kiu videblis la ŝultroj kaj la nudaj brakoj. Sed lia karno estis kiel la tero de la kamparo. Ĝi havis ĝiajn formon kaj koloron. Anstataŭ haro, estis al li densa muskotufo, kaj li havis sur la kapoverto unu neston de alaŭdo enhavanta du birdidojn. La patrino flugadadis ĉirkaŭ lia kapo. En la vizaĝo li havis barbeton de fajna herbo plenplena je lekantetoj, malgrandaj kiel pinglokapoj. Ankaŭ la dorso de liaj manoj floris. Liaj piedoj estis prerioj, kaj nanaj kaprifolioj grimpis siajn krurojn, kvazaŭ sur fortaj arboj. Pendita el la ŝultro, li portis raran fluton.

»Li estis fortika kaj gaja almozulo, kaj li rakontis al mi ke ĝermis liaj karnoj pro tiom da piedirado sur vojoj, pro tiom da suna kaj pluva faloj kaj ĉar li neniam havis domon. Li diris al mi ke vintre naskiĝis al li musko tra la tuta korpo kaj aliaj plantoj de granda ŝirmo, kiel sur la kapo, sed ke kiam venis la printempo sekiĝis al li tiu musko kaj tiuj plantoj kaj tiuj falis al li, por ke naskiĝu la herbo kaj la lekantetoj.

»Poste li klarigis al mi kia estis la fluto. Li diris ke mala al la aliaj, kaj ke oni devis ludi ĝin meze de granda bruego, ĉar anstataŭ esti, kiel en la aliaj, la silento, fono kaj la sono, melodio, en tiu la bruo estis fono kaj la silento estis melodio. Li ludis ĝin meze de la grandaj ŝtormoj, inter fulmotondroj kaj pluvego, kaj eliris el ĝi notoj de silento, fajnaj kaj malpezaj, kiel nebulfadenoj. Kaj li timis nenion.

»Mi pasigis la vesperon parolante kun li, kaj la nokto tuj falis sur ni. La almuzulo invitis min dormi en sia arbostumpo. Ni iome piediris kaj alvenis al ĝi. Estis granda arbo, kaj ene estis multaj aĵoj ne bone videblaj. La trunkotruo estis altega, supreniris kiel konuso kaj la ligno faris krestojn, turnaĵoj kun alenaj eĝoj, kiel la lamenoj de fungoj. Supre, oni vidis ke bluiĝis la nokto kun steloj.



»La almuzulo fajrigis olelampon, kaj mi vidis blankan flameton, lumigan. Estis la vejnoŝtono. Tiam mi rakontis al li kiel mia patro estis ĉiam deziregante tiun ŝtonon, kaj la almuzulo, kiu estis malavara, donacis ĝin al mi. Mi apenaŭ povis dormi tiun nokton, kaj la venontan matenon mi ekfaris la revenan vojon. Mi alvenis hejmen kriante: «¡Paĉjo, paĉjo!».

»Sed enirinte en la ĉambro de mia patro, mi vidis, ke li estis mortiĝinta. Ĉiuj estis ĉirkaŭ li, kvietaj kaj silentaj. Ili eĉ ne rigardis kiam mi eniris. Mia patro kuŝis sur tavolo, envolvita en blanka bendo kaj oni vidis nur lian vizaĝon. Li havis la buŝon malfermita kiel maljuna fiŝo kaj la lumo de kvar olelampoj brilis en la vitreca fendeto de liaj duonapertaj okuloj. Mi ne plu rigardis, kaj foriris plori metinte la vizaĝon en viola kurteno kiu estis hejme, kiu estis la kurteno kie mi ĉiam ploris.

La majstro levis la okulojn kaj rigardis la fajron kiun Alfanhúí estis fajriginta por li. Poste li pluis:

—Kelkajn tagojn post lia entombigo mi elektis la plej belan lampon kiun mi povis trovi kaj preparis olelampon per la vejnoŝtono por alporti ĝin al la tombejo. Mia patro dormis en kaverno, subtere, metita en vitra urno. Vidinte min neniun, mi eniris tien kaj pendigis la lampon el la muro, ĉe la kaploko. Poste mi fajrigis ĝin el tiu kiun mi estis portinta kaj rigardis la mienon de mia patro je la lumo de la blanka flameto.

La majstro silentiĝis kaj rigardis al Alfanhúí, kiu kuŝis surplanke ĉe la kameno. La fajro estis jam apenaŭ subbrulo. La majstro stariĝis el sia seĝo kaj eliris al la lito. Alfanhúí restis pensema apud la fajrujo, ekscitante la karbaĵojn per bastoneto.

Tradukita de Kani el la originalo far Rafael Sánchez Ferlosio (daŭrigota)

E-KULTURO EN HISPANIO EKSTER ESPERANTUJO

Caja de Resistencia estas hispana duonjara ret-revuo pri nuntempa soci-kritika poezio, verŝajne la plej grava el tiuspecaj publikaĵoj, kolektive administrata kaj gvidata. Ĝi aperas maje kaj oktobre kaj libere alireblas en jena retejo: <http://cajaderesistencia.cc/>. La poemoj en ĝi publikigataj devas pli frue trapasi rigoran procezon de elekto far juĝkomisiono. Ni esperantistoj povas fieri, ke, de kiam la revuo vidis la lumon ĝis nun, la E-poezio estis en ĝi

konstante reprezentata. En la unua numero, ĝueblis la poemo *2010*, de nia galega E-poeto Suso Moinhos, en la originala E-versio kaj en lia hispanigo [<http://cajaderesistencia.cc/caja-de-imprensa/caja1-numero1/moinhos/>]. En la dua numero, legeblis mia *Apostolo de la Ideo*, kune kun mia traduko de ĝi en la hispanan: *Apóstol de la Idea* [<http://cajaderesistencia.cc/caja-de-imprensa/caja1-numero2/fernandez/>], kaj, plie, Suso kunlaboris hispanigante poemojn de du rumanaj poetoj.

Nu, en la ĉi-jara majo la tria numero de *Caja de Resistencia* tre ĝojigis nin esperantistojn per prezentado de nia ĉina poeto Mao Zifu kaj de du el liaj poemoj, *ĉele* kaj *fenestro*, el lia poemaro *Kantoj de Anteo*, kiun siatempe mi havis la honoron prologi [<http://cajaderesistencia.cc/caja-de-imprensa/caja1-numero3/zifu/>]. Ĉi-okaze, aparte plezurigis min, krom okupiĝi pri la hispanigo de la menciita paro da poemoj de mia ĉina poeto-frato, ricevi el la gvida skipo de *Caja de Resistencia* gratulon kaj dankon pro la digna kaj interesa kontribuo de E-poetoj al la prestiĝo de la revuo. Kia korekara monro de respekto al la E-poezio!



Mi instigas poeziemulojn kun scipovo pri la hispana traĝui la tri numerojn de *Caja de Resistencia*. Mi vokas vin lirik-amajn esperantistojn tralegi la versojn de ĉiuj tri E-poetoj prezentitaj en la ret-revuo. Kaj, se vi ŝatas ilin, mi proponas al vi manifesti tion alklakante la vinjeton de koro videblan super la supra dekstra angulo de la foto de ĉiu el niaj bardoj. Tiel ni evidentigos, ke ni e-istoj ekzistas kaj ke Esperantujo aplaŭde pravigas la elekton faritan de la juĝkomisiono de *Caja de Resistencia*. Cetere, nome de ties gvida skipo, mi invitas E-poetojn sendi siajn soci-kritikajn versojn (po, maksimume, 3 poemojn), al info@cajaderesistencia.cc por submeti ilin al la konsidero de la juĝkomisiono, kiu decidos pri ilia (ne)publikindeco.

Dualoke, mi volas paroli al vi pri alia publikaĵo: *Humanitat Nova*. Temas pri dulingva (kataluna-hispana) ĉiujara revuo pri liberecanaj kulturoj, produktita de la majorka eldonejo Calumnia. Sendube, ĉi nomo konatas al multaj el vi. Efektive, pasintjare Calumnia eldonis la esperantlingvan antologion de soci-kritika poezio *Nova mondo en niaj koroj* (akirebla i.a. ĉe Libroservo de UEA) ene de la kolekto *Revo lucida*, kreita por E-verkoj pri liberecanaj temoj. Okazas, ke ankaŭ pasintjare tiu eldonejo lanĉis la revuon *Humanitat Nova*.

Kaj jam en ĝia unua numero legeblis hispanlingva artikolo pri la “verda idiomo”: *El esperanto y la nueva humanidad* [Esperanto kaj la nova humaneco], aŭtorita de la madrida e-isto Pedro Sanz. Nu, en la dua numero, kiu vidis la lumon en majo 2017, aperas kontribuadoj de tri e-istoj. Unue, eblas legi hispanlingvan eseon de la kataluno Javier (pli konata kiel Xavi) Alcalde: *El esperanto humanista y revolucionario* [Esperanto humana kaj revolucia]. Per ĝi, Alcalde nuancas asertojn faritajn de Sanz en ties menciita teksto. Due, legeblas ses poemoj miaplumaj en la originala esperanta versio kaj en hispanigo farita de mi mem. La esperanta versio de kvin el ili jam antaŭe premieris en diversaj numeroj de *Sennaciulo*. Trie, ĝueblas desegno aŭtorita de la franca e-isto Serĝo Sir’, same jam publikigita en la SAT-organo kiel ilustraĵo por mia poemo *Apostolo de la Ideo*.

Ekzempleroj de la revuo kaj de ĉiuj eldonaĵoj de Calumnia mendeblas poŝte (Apartat de Correus 278, 07350 – Binissalem – Mallorca, España), retpoŝte (info[at]calumnia-edicions.net) kaj tvitere (@calumniaeditor). Tiuj samaj adresoj uzeblas por esprimi al la eldonistoj dubojn, sugestojn, kritikojn... Kaj eĉ gratulon. Bele, se multaj el vi manifestos al ili viajn ĝojon kaj dankon pro la fakto, ke ili tiel ame prizorgas Esperanton.

Cetere, la pasintan 19an de majo okazis la prezentado de la poemaro *Vamos, vemos / Ni iras, vidas*, de la fama hispana poetino María Ángeles Maeso, en dulingva (hispana-esperanta) versio, publikigita de la neesperanta eldonejo Lastura, kaj en traduko kaj kun prologo de mi mem. La prezentado havis lokon en prestiĝa madrida kultura spaco: la sidejo de Nuevo Teatro Fronterizo [Nova Teatro ĉe la Limo], gvidata de la meritplene eminenta hispana dramaturgo José Sanchis Sinisterra. Maeso kaj mi i.a. deklamis plurajn poemojn de la libro en la hispana kaj, respektive, Esperanto, en etoso malstreĉa, entuziasma kaj plena de pozitiva energio. Fine ni ambaŭ subskribis ne magran nombron da ekzempleroj de la dulingva poemaro. Sanchis Sinisterra petis pli da tiel altnivela poezio kaj pli da Esperanto en Nuevo Teatro Fronterizo.



Kvin tagojn poste, en la vespero de la 4a de majo ni, proksimume 25 hispanaj gepoetoj, partoprenis en plej kurioza poezia aranĝo: migra poemdeklamado en diversaj placoj de la madrida populara kvartalo Malasaña. Jen poezio sur la stratoj, apud la popolanoj, apud ties inferoj kaj paradizoj. Kiel endas. Ĝi estis la lasta programero de la ĉi-jara VersoLab. Temas pri la poezia flanko de la plurfaka festivalo LaborArte. Ĉi tiu konsistas el plej diversaj kulturaj manifestacioj videbligantaj la laboristan mondon surbaze de tio, ke ĝi estas esenca elemento de la disvolviĝo de la civila socio kaj de la interesoj de kreantoj kaj interpretistoj kiel partoj de ĝi. LaborArte'on organizas la madrida kulturcentro Conde Duque kune kun ILO, Internacia Labor-Organizo, tripartia UNO-agentejo, kie kunlaboras registaroj, dungantoj kaj laboristoj el 187 ŝtatoj-membroj kun la celo starigi labornormojn, formuli politikojn kaj ellabori programojn kapablajn stimuli dignan laboron por geviroj.

Mi estis invitita kiel E-poeto. La unua komuna voĉlego de poemoj okazis en la “startejo”, la ĉefkorto de la kulturcentro Conde Duque. Oni disdonis al ni ĉiujn hispanlingvaj kvarversojn pri la temo “laboro” pli frue senditajn de kiu ajn volis partopreni. Kaj, plej kurioze kaj nekredeble, alfalis al mi voĉlegi ĝuste la tri kvarversojn aŭtoritajn de mia amiko kaj kamarado de la Ibera Grupo Jorge Camacho!!!



Gvidate de poeto kun portebla afiŝo, sur kiu legeblis *Poesía de paseo* [Poezio en promeno], kaj akompanate de muzikisto, kiu ludadis grekan buzukon, ni promenis de placo al placo, kie ni haltadis, aranĝis nin en rondo kaj sinsekve voĉlegis proprajn aŭ aliulajn poemojn uzante megafonon. Miavice, mi prezentis min per la klarigo, ke mi deklamos mian hispanigon de poemoj originale kreitaj de mi mem en Esperanto, mia verkolingvo, kio vekis grandan simpation. En unu el tiuj haltadoj, la poeto Antonio Crespo Massieu (unu el la ĉefaj figuroj de la nuntempa hispana soci-kritika poezio), plurajn el kies poemoj mi esperantigis por la jam menciita antologio *Nova mondo en niaj koroj*, petis min deklami miajn versojn ankaŭ en Esperanto. Tion mi faris. La reago de miaj kolegoj estis vere kor-karesa. La beleco de nia lingvo entuziasmigis ilin. De tiam, miajn ceterajn deklamojn mi faris dulingve (hispane-Esperante). Alia madrida esperantisto, Manolo Pancorbo, kiu partoprenis la promenon, asertis poste en la ret-forumo “esperanto-madride”: “la

homoj estis impresitaj de la son-nuancoj de nia lingvo”.

Kia ĝojo konstati ĉi plian sukceson de la E-poezio en Hispanio ekster Esperantujo!

Aliflanke, la pasintan 21an de aprilo, tri membroj de la Ibera Grupo, Ana Manero, Jorge Camacho kaj mi mem, kune kun la fama hispanlingva poeto Alberto García-Teresa, prezentis dulingve (hispane-esperante) poezian vesperon en la konata madrida memmastrumata kulturcentro EKO, kadre de la liberecanaj kulturaj rencontiĝoj JACA3. Eta parto de la prezentado far tiu grupo spekteblas en jena retejo: <https://youtu.be/D66qmlkr6Qc>.

La 25an de majo, Suso Moinhos sendis al la retforumo “iberia esperantistaro” jenan informon:

“Inter la 10a kaj la 13a de majo okazis en Palma de Majoroko la 19a Poezi-Festivalo de Mediteraneo, al kiu mi estis invitita por prezenti miajn poemojn en Esperanto. Entute ni estis 14 poetoj en pluraj lingvoj (angla, franca, hispana, kataluna, nepala, portugala, rumana...).

“La densa programo portis nin al la mezlernejo Joan Alcover (kie ni deklamis kune kun la lernantoj), al surstrataj poezi-eventoj, al prezentado en aliaj lokoj de la insulo (mi iris al Inca), al registrado de niaj versaĵoj en la Fondaĵo ACA kaj al la Festo de Poezio, en la Ĉefteatro de Palma, kie kuniĝis niaj voĉoj kun danco, pianmuziko kaj projekciitaj bildoj.


“Mi ĉiam deklamis esperante. Post la prezentado en la teatro, unu el la mecenatoj de la festivalo venis al mi kaj tre pozitive asertis, ke de nun ŝia bildo pri esperanto ŝanĝiĝis por ĉiam. Poste, ekster la teatro, majorkaj samideanoj varme akceptis min kun esperantaj flagoj.



“La organiza teamo, sub la gvido de la poeto Biel Mesquida, portis nin al diversaj vidindejoj en Majorko, kaj invitis nin al bela programero de la festivalo: neforgesebla koncerto de la hispana kantisto Paco Ibáñez. Mi tre dankas la organizantojn pro ties konstanta prizorgado, pro la amo, per kiu ili traktis nin ĉiujn, kaj pro tio, ke ili konsideris esperanton plia verklingvo, samrange kun la ceteraj.

“En siaj publikaj prezentoj, Biel Mesquida, direktoro de la festivalo, menciis, ke ni festas la jaron de Zamenhof, kaj kortuŝe parolis pri la majorkaj esperantistoj murditaj dum la enlanda milito”.

Menciindas, ke, fine de la pasinta aprilo, la galeglingva ret-ĵurnalo *Praza Pública* publikigis la artikolon de Suso Moinhos *O esperanto, cem anos após a morte de Zamenhof* [Esperanto, cent jarojn post la morto de Zamenhof], legeblan en <http://praza.gal/opinion/3963/o-esperanto-cem-anos-apos-a-morte-de-zamenhof/>. Se paroli plue pri Moinhos, oni ĵus aperigis du liajn poemojn en portugala traduko en la sendependa literatura revuo *Tlön*, eldonata en Porto (Portugalia) (n-ro 2, 2017). Plie, kvankam temas pri pasintjara afero, memorindas *Vozes do esperanto* [Voĉoj de Esperanto], fasko da poemoj de 14 E-aj autoroj, kiujn Moinho tradukis en la brazilan portugalan. Ĝi aperis en la traduk-revuo *Revista literária em tradução*. Número 12º, 1º vol., jun. 2016, Brazilo.



Dum la monatoj aprilo kaj majo spekteblis en diversaj teatroj de la Valencia Regiono katalunlingva tragikomedio nomata *Els esperantistes*, kies protagonistoj ludas la gefilojn de valenciaj aktivaj esperantistoj. La verkon aŭtoris la konata dramaturgo Paco Zarzoso, kiu kreis ĝin por la renoma trupo A Prop Teatre. Iam, dum la disvolviĝo de la intrigo, kadre de monologo, fonas la voĉo de nia Liven Dek, voĉo kantanta lian esperantan version de la fama kanto *Libre* [Libera], de la karmemora valencia kantisto Nino Bravo. Fine de la teatraĵo, ĉiuj geaktorj kunkantas tiun esperantan tekston.

Aliokaze, nia traduka literaturo rolis en Hispanio kuntekste de neesperantaj kulturaj aranĝoj. En la pasinta 23a de aprilo, Internacia Tago de la Libro, du madridaj esperantistoj, Alejandro Pareja Rodríguez kaj Darío Mora Garcés, deklamis po unu esperantlingvan fragmenton de la romano *Don Quijote*, en la kutima voĉlegado de la verko, kiu ĉiujare organizas Círculo de Bellas Artes de Madrido. Dum 48 seninterrompaj horoj, diversaj unuopuloj kaj reprezentantoj de kulturaj organizoj sinsekve voĉlegis fragmentojn de la senmorta ĉefverko de Cervanto, omaĝe al li en la 401-jara datreveno de lia morto. Kiel tradicie, Madrida Esperanto-Liceo estis invitita partopreni per du el siaj anoj. La tekstojn al ili asignitajn ili deklamis en Esperanto, laŭe al la traduko *La ingenia hidalgo Don Quijote de la Mancha* far la karmemora hispana tradukmajstro Fernando de Diego. Iliaj deklamoj spekteblas ĉe: <https://youtu.be/wDrhBFX1X1E>.



Kaj laste, sed ne balaste, kaj same pri Donkiĥoto, la 19an de aprilo, por soleni la Tagon de la Libro, la biblioteko de la Hispana Parlamento ricevis pli ol 30 volumojn de la cervantesa majstraĵo, la dua verko plej tradukita en la mondo, en pli ol 25 lingvoj. Inter ili troviĝis ekzemplero de la antaŭe menciita esperanta versio, kiun Toño del Barrio, la HEF-prezidanto, donacis mem, kadre de ofi-

ciala aranĝo en unu el la solenejoj de la Parlamento. Ĉi novaĵon distantamis ĉiuspecaj hispanaj amaskomunikiloj.

Kaj jen ni hispanaj esperantistoj plue laboras en ĉi jaro zamenhofa...
Sanon kaj E-kulturon!

Miguel Fernández

Al ĉies amiko Luis Serrano, kiu nun ripozas pace

Laŭlonge de kelkaj jaroj
Unuigis nin la lingvo:
Iluziojn, amuzaĵojn,
Surprizojn, feliĉajn tagojn,

Seninterrompajn kunsidojn
En la plej belaj vilaĝoj
Rekomendindajn strandojn
Riĉajn kaj luksajn hotelojn, kaj
Agrablegajn ekskursojn
Ni ĉiuj samideanoj
Ovacias vin kun amo.

Pro via sindona agado
Energia mastrumado
Ridema, luma vizaĵo
Elmontrado de kuraĝ' kaj
Zorgema kvazaŭ patro.

Ángel Arquillos